# NORDA GAZETO

DUMONATA BULTENO
DE LA
NORDFRANCA ESPERANTO-FEDERACIO

Redaktoro kaj responda eldonanto :
Lucien BOURGOIS,
21, Rue Gambetta,
NOYELLES-GODAULT (P.-de-C.).
Ĉiun presigotan materialon
oni sendu al la ĉisupra adreso.

Kotizoj (kun bulteno)

| | | |
|---|---|---|
| a) Junuloj | : | 2 Fr. |
| b) Aktiva membreco | : | 3 Fr. |
| c) Subtenanto | : | 5 Fr. |

pagendaj al C.C.P. LILLE 517-15
Fédération Espérantiste du Nord,
209, Rue Rouault, ARRAS (P.-de-C.).

---

Ĝenerala Sekretario : S-ro Fernand DITACROUTE, 178, Chemin Castre, CALAIS.

Departementaj Sekretarioj :

| | | |
|---|---|---|
| Nord | : | S-ro Jean LENEL, 26, Rue Donckèle, Hazebrouck. |
| P.-de-C. | : | S-ro Edouard BONVOISIN, 4, Rue Duchesse de Kingston, Apt 41, Calais |
| Somme | : | F-ino MAUCHIEN, 10, Rue de Noyon, Amiens. |

---

Informilo n° 4 Julio-Aŭgusto 1963

## Sukcesa Federacia Kongreso en Valenciennes.

En "Salono Chatham" de la moderna urbdomo de Valenciennes ĉeestis 60 ges-anoj. Kiel kutime, kontentiga partopreno.

Senkulpiĝis Ges-roj Van Parys, S-roj Bonvoisin, Buerick, Contart, Doyelle, Dumarquez, Lenel, Lesoin, Philippe.

La ĉeesto de multaj esperantistoj el najbaraj landoj donis al tiu renkontiĝo internaciecan karakteron. 11 Belgoj : S-ro Paulus, Prezidanto de la Karolreĝa Grupo kun edzino, F-ino Orsolini kaj S-ro Marcoux, el Karolreĝo, S-roj Piron (Namuro), Demesmaeker (Erembodegem), Gallez (Heusies), Ges-roj Van Roye (Heule), Ges-roj Debrouwere (Kortrejko). 3 Nederlandanoj : Ges-roj Ben Weber kaj filo. 2 Germanoj : Ges-roj Jidizy, el Düren.

S-ro Ligot, Prezidanto de la loka grupo malfermis la kunsidon kaj tuj transdonis la parolvicon al S-ro Odent. Nia federacia Prezidanto bonvenigis la ĉeestantojn kaj aparte niajn eksterlandajn gastojn, rimarkigante, ke E-o estas ĉies propraĵo, kaj ne nur franca afero, eĉ en Valenciennes.

S-ro Lucien Bourgois prezentis la agadraporton de nia federacio dum 1962 kaj, for-este de nia kasisto, S-ro Doyelle, li priparolis la financan situacion.

La 1-an de januaro, nia kaso montris krediton je Fr. 569,55. Ni ricevis poste subvenciojn de departementoj Nord (500 Fr.) kaj P.-de-C. (100 Fr.). Ni partoprenis en la deficito de la Dovra Kongreso (100 Fr.). Ni nun disponas pri 900 Fr. Tamen, nia kasisto plendas pri tio, ke multaj federacianoj ankoraŭ ne pagis ĉi-jare. "SE VI DEZIRAS REGULE RICEVI LA BULTENON, REGULE PAGU LA KOTIZON" : aldiris S-ro BOURGOIS.

Vi povis konstati, kiel belaspekta estas nun nia federacia bulteno, kiun ni presigas de esperantista fakulo, S-ro Delaire. Ĝi estas ankaŭ pli legebla; sed ĝi ja plikostas. Nia kasisto proponis anstataŭigi la bazan membrecon, 2 Fr. per 3 Fr. La junuloj nur pagu 2 Fr. la kotizo de subtenantoj restu 5 Fr. (Propono unuvoĉe akceptita).

Ĉiam nome de S-ro Doyelle, li priparolis la proksiman Konfederacian Kongreson. La Belga Ligo intencas okazigi ĝin en 1965. Ĝi do okazu en Francujo en 1964. S-ro Ditacroute, Vic-reprezentanto de la NFEF por la Markola Konfederacio anoncis, ke li klopodas por organizi ĝin en Kalezo. Li atendas baldaŭan decidon de siaj lokaj amikoj.

S-ro Bourgois anoncis, ke S-ro Ditacroute fariĝas la nova federacia sekretario. Pro manko de tempo, li devis rezigni tiun funkcion, sed plue zorgos pri la redaktado de la bulteno.

Poste, S-ro Giloteaux legis raporton de S-ro Contart pri la Nacia Kongreso de UFE, okazinta en Perpignan kaj anoncis, ke du membroj de la federacio, S-ro Odent kaj li mem, estis elektitaj kiel anoj de la Nacia Konsilantaro. Li sciigis, ke la nova redaktoro de F.E. estas Jean Thierry, anstataŭanta S-ron Pierre Petit. Li gratulis nian federacianon Roger Gaudoux, kiu gajnis la unuan premion de la UFE-kampanjo : vojaĝo al Sofio. Li poste priparolis la gravan ekspozicion, kiu havos lokon en la urbdomo de Tourcoing kaj okaze de kiu, konsentite kun S-ro Delcourt, estos organizata federacia tago. La dato estos, ĉu la 13-an de oktobro, ĉu la 20-an. Ankaŭ, li akcentis pri tio, ke la Universala Kongreso de UEA en 1964, okazos sufiĉe proksime de ni, en Hago (Nederlando). Poste, li parolis pri diversaĵoj : novaj libroj kaj revuoj, demonstracia leciono de E-o, okazinta en Lille antaŭ internacia publiko, sukcesa ekspozicio de nia amiko Bourgois en Hénin-Liétard.

Prenis denove la parolvicon S-ro Odent pri la ekzisto de federacia biblioteko. La membroj pagintaj la federacian kotizon 1963 povas mendi senpage tre interesajn librojn.

S-ro Ignaco Flaĉinski, el Houdain, esprimis la opinion, ke, paralele kun ĝemeligoj inter eksterlandaj esp-istoj, estu ĝemeligoj inter regionaj grupoj.

Post la tradicia loterio, la kongresanoj estis oficiale akceptitaj de la vicurbestro, S-ro Decool, reprezentanta la urbestron de Valenciennes, detenatan. Ankaŭ ĉeestis la urba Ĝenerala Sekretario, S-ro Morelle, kaj la oficejestro, S-ro Hennique. S-ro Decool gratulis la kongresanojn pro ilia agado; kaj S-ano Bouquin respondis per elokventa parol-adeto.

Post la honorvino, niaj amikoj Lucien Bourgois, René Curnelle kaj Roger Gaudoux, laŭreatoj de la tradukkonkurso, ricevis sian premion de S-ro Decool. Raportistoj (reporteroj) de la regiona televido filmis ilin. Nia poeto, S-ro Guy Auguez deklamis sian poemon "Etre Espérantiste" kaj tiel fermis la oficialan ceremonieton.

Je la 13-a, 55 kongresanoj partoprenis la bankedon ĉe "Hôtel Central". Tre gaja atmosfero, agrabligita per kantoj kaj anekdotoj.

Posttagmeze, ekskurso kondukis ĉiujn per privataj aŭtoj ĝis Bavay por la vizito de romia muzeo. Finiĝis tro rapide tiu tago okaze de kiu ni retrovis kun tiom da plezuro - kiel ĉiam! - ĉiujn niajn karajn amikojn el la tuta federacio kaj eksterlando.

Ni petas Ges-rojn Ligot kaj la lokoko-anojn akcepti varman dankon kaj sinceran gratulon pro la perfekta aranĝo de tiu renkontiĝo.

Nun, ĝis TOURCOING... EN OKTOBRO !

Fernand DITACROUTE.

Agadraporto de la Nordfranca Esperanto-Federacio - Jaro 1962

Federaciaj manifestacioj : La federacio kunvenis en Lille, la 22-an de aprilo, en la kadro de la internacia Lille-Foiro. Ĉeestis 50 ges-anoj.

De la 12-a ĝis la 13-a de Majo traokazis en Bulonjo ĉe Maro la 1-a Markola Kongreso. Sabate, en la Komerco-Ĉambro, okazis la laborkunsido. Ĉeestis 45 delegitoj el 6 landoj, kun vizitantoj de la Normanda Federacio kaj unuopuloj el Chartres kaj Tours. La federaciaj reprezentantoj de Sudorienta Britujo (Norman H. SMITH) kaj Nord-Francujo (Jacques DOYELLE) proponis fondon de neformala trilanda organismo, kiu alprenis la nomon : "Markola Konfederacio".

Dimanĉe, la 13-an de Majo, post la Esperantlingva prediko de katolika Sacerdoto WAROT, en ĉeesto de 60 esperantistoj, ĉiuj iris por omaĝi la memoron de D-ro ZAMENHOF, kaj S-ino HANICOT deponis florojn sur lian memortabulon, ĉe Tintelleries. Bankedo arigis 100 kunmanĝantojn, en gaja etoso.

La 7-an de oktobro okazis nia jara kongreso en Amiens. Ĉeestis 60 federacianoj krom S-roj LLECH-WALTER, Prezidanto de U.F.E. kaj Pierre PETIT, redaktoro de "Franca Esperantisto".

Publikaj rilatoj : Ni ricevis subvenciojn de la departementaj instancoj en Nord kaj Pas-de-Calais.

La 14-an de Januaro, S-ro PHILIPPE, Honora Prezidanto de nia federacio fariĝis membro de la Akademio de Arras. Tiuokaze, en salono de la tiea urbdomo, li eldiris festparoladon, kiu traktis la temon : "La Lingvo Internacia, solvo de la lingva problemo en la nuntempa mondo". Krom la multnombra neesperantista publiko, ĉeestis 20 federacianoj. Menciinde, ke S-ro PHILIPPE ankaŭ fariĝis honorprezidanto de U.F.E.

La Vicurbestro de Valenciennes publike menciis la rolon, kiun ludas la lokaj esperantistoj, en la ĝemelrilatoj kun la germana fraturbo Düren.

En Tourcoing, S-ro GILOTEAUX partoprenis la debaton dum la Kongreso de franc-germanaj kulturaj asocioj.

Vizitoj de eksterlandanoj : La 1-an de decembro de la pasinta jaro, S-ro Jack HAWKS, Vicprezidanto de la grupo de Perth (Okcident-Aŭstralio) vizitis S-ron DOYELLE en Bourbourg, S-ro Ben WEBER, Vicdelegito de U.E.A. en Middelburg (Walcheren-insulo en Nederlando) ĉeestis niajn federaciajn renkontiĝojn en Lille kaj Bulonjo. Ankaŭ, li vizitis S-rojn GILOTEAUX kaj LENEL. Profesoro Taro NIŜIUMI, el la Universitato de Tokio, vizitis la esperantistajn grupojn en Hénin-Liétard (2-an de aprilo), Roubaix (5-an de aprilo) kaj Bourbourg (14-an de aprilo). Okazis publikaj vesperoj kun projekciado de diapozitivoj kaj traduko por la neesperantista aŭdantaro. S-ro NIŜIUMI ankaŭ vizitis federaciajn delegitojn en Arras (Monnier) kaj Amiens (F-ino Mauchien).

La 19-an de majo, sep germanaj esperantistoj el Düren vizitis la grupanojn el Valenciennes. Krome okazis privataj vizitoj de eksterlandaj gastoj : Ges-roj LANGENBERG el Wormerveer, apud Amsterdamo, vizitis ges-anojn BOURGOIS (Noyelles-Godault) kaj LENEL (Hazebrouck).

Nia membro Roland DELATTRE, el Roubaix, vizitis esperantistojn en Italio kaj Alain BOURGOIS, el Hénin-Liétard, vizitis la Centran Oficejon de Helena Esperanto-Asocio en Ateno (Greklando).

Universala Kongreso en Kopenhago : Reprezentis la federacion : F-ino MAUCHIEN (Amiens), F-ino VERBEKE (Lille) kaj S-ro MONNIER (Arras).

Gazetservo : Respondecas pri ĝi S-ro GILOTEAUX, kiu ofte aperigis informojn pri nia regiona movado en la diversaj ĵurnaloj.

S-roj Lucien BOURGOIS kaj CONTART aperigis propagandajn artikolojn en "L'Espoir"; S-roj CONTART kaj DUMARQUEZ verkis varbartikolojn por la "Porinstruista Sindikata Bulteno en Pas-de-Calais".

S-roj GILOTEAUX kaj BOURGOIS rebatis kontraŭesperantan artikolon aperintan en "Lectures pour Tous". Tiu ĉi konata monata revuo aperigis poste la leteron de S-ro GILOTEAUX, kun trafaj argumentoj favoraj al la internacia lingvo kaj reklamo pri la nacia asocio U.F.E.

Informado : S-roj BOURGOIS kaj ODENT komunikis al S-ro Pierre BURNEY siajn kritikojn pri lia verko "Les Langues Internationales", eldonaĵo de "Presses Universitaires". S-ro BURNEY konfesis, ke li estis misinformita de la revuo "Cosmoglotta" rilate la sufiksojn "or" kaj "iv" kaj la vorton "radar". Fakte, la fako de tiu eminenta lingvisto nur ampleksas la naciajn eŭropajn ĉeflingvojn; kaj ni esperas, ke li utiligos niajn rimarkigojn por venonta eldono.

Federacia Bulteno : Ĝi regule aperadas kaj ampleksas ses paĝojn.

U.E.A.-delegitoj : Ni plezure notis tri novajn delegitojn de Universala Esperanto-Asocio en gravaj urboj de departemento Nord :
S-roj Roger COCQUET (Lille), LEGRAND (Roubaix), kaj DELCOURT (Tourcoing).

Ekspozicioj : Esperantaj ekspozicioj okazis en Hazebrouck, Kalezo kaj Valenciennes.

Perkoresponda kurso : S-ro LENEL respondas pri tiu fako. Mi insiste petas, ke la federacianoj enskribigu lernantojn en la lokoj, kie ne funkcias publika kurso. Tiu lasta rimedo estas ja la plej efika; tial la kapableculoj devas malfermi kurson aŭ instrui hejme kaj varbi membrojn por nia regiona asocio. Antaŭ la malfermo de kurso necesas propagandi, kaj la profesoroj interrilatu kun S-ro GILOTEAUX por aperigo de trafaj artikoloj en la gazetaro. Lia adreso estas : 7, Rue St-Saëns, WATTRELOS (Nord). Por la perkoresponda kurso oni sin turnu al : Jean LENEL, 26, Rue Donckèle, HAZEBROUCK (Nord).

Publikaj kursoj : Dum la pasinta lernjaro funkciis publikaj kursoj en Arras (S-roj MONNIER kaj ODENT), Bourbourg (S-ro DOYELLE), Hazebrouck (S-ro LENEL); Hénin-Liétard (S-ro BOURGOIS), Lille (S-ro Roger BOCQUET) kaj Valenciennes (S-ro LIGOT).

Grupkunvenoj : Okazis ĉiusemajne en Arras kaj Hénin-Liétard;
ĉiumonate en Lille, Roubaix kaj Valenciennes.

Tradukkonkursoj : La federacio decidis patroni tiun fakon kaj konfidis al S-ro GILOTEAUX ties funkciadon. La plej bonaj kontribuaĵoj estos rekompencitaj per libropremioj. Ni varme rekomendas al niaj "Kapableculoj" partopreni.

Atesto pri kapableco : Nia federacio povas fieri pri la rezultatoj de tiu studjaro. Sukcesis : S-roj Roger BOCQUET, Lucien BOURGOIS, Jean LENEL, Marcel LIGOT, F-ino Georgette PREUX kaj S-ro Alain RINGOTTE.

Raportis : Lucien BOURGOIS.

# FINANCA RAPORTO 1962

## KASO

| Kredito | | Debeto | |
|---|---|---|---|
| Antaŭa kredita saldo......... | 50,45 | Akiraĵoj : Diapozitivoj............ | 30,00 |
| Kotizoj rekte enkasigitaj ..... | 54,00 | Poŝtmarkoj, kovertoj..... | 26,00 |
| Vendo de propagandaĵoj ..... | 23,60 | Afiŝoj, Poŝtkartoj ........ | 9,00 |
| Debeta saldo........... | 36,95 | Mono pruntedonita al la Bulonjaj Kongresorganizantoj...... | 100,00 |
| | 165,00 | | 165,00 |

## POŜTĈEKKONTO

| Kredito | | Debeto | |
|---|---|---|---|
| Ĝiritaj kotizoj ........... | 264,00 | Propagandelspezoj (jurnaloj)...... | 20,00 |
| Oficialaj Subvencioj...... | 750,00 | " " (Internacia Foiro) | 72,00 |
| Repago de Bulonja grupo... | 89,00 | Administraj elspezoj ............. | 43,25 |
| Antaŭa kredita saldo....... | 202,24 | Akiro de diapozitivoj, sonbendo.... | 36,00 |
| | 1305,64 | " de kantarfolioj.............. | 94,05 |
| | | Filmoluo....................... | 19,00 |
| | | Financa helpo al nacia gazeto..... | 100,00 |
| | | "Norda Gazeto"................. | 314,84 |
| | | | 699,14 |
| | | KREDITA SALDO................. | 606,50 |
| | | | 1305,64 |

| | |
|---|---|
| Kredita Saldo (pĉk) : | 606,50 |
| Debeta Saldo (kaso) : | 36,95 |
| KREDITO je la 1-1-63 : | 569,55 |

Raportis : Jacques DOYELLE.

Radio : Gvidata de S-ro DELAIRE, Esperanto-kurso okazas ĉiujaŭde matene de 9.30 ĝis 9.45 MET laŭ la ondlongoj 280 m k 235 m.

Televido : En la regiona ĵurnalo, mardon 25-an de junio, vidiĝis sur la "ekraneto" la oficiala akcepto de la kongresanoj en Valenciennes, dimanĉon 23-an de junio kun disdono de libropremioj al la laŭreatoj de la federacia tradukkonkurso.

La proksima konkurso estos E-lingva teksto pri "la plej bona libro, kiun mi legis en E°" aŭ pri "E° kaj miaj ferioj".

El la gazetaro : "La Semaine Radiophonique" komunikas :
Okaze de sia 23-sesio, la Radiofonia Unio de Franclingvaj Programoj ĵus atribuis sian jaran ĉefpremion al "Esperanto-Koncerto" de Julien-François ZBINDEN, kiun prezentis la Svisa Radiodisaŭdiga Societo (elsendilo Sottens, studio Lausanne).

NIA ADRESARO : Ni bonvenigas jenajn novajn membrojn :

| | | |
|---|---|---|
| Amiens (Somme) | S-ino Morel | 48, Rue Jean-Jaurès |
| " " | S-ro Dreno, Instruisto | 34, Rue du Général-Leclerc. |
| Anzin (Nord) | F-ino Gilliard Edith | 25, Rue Kléber. |
| Denain (Nord) | S-ro Chobert | 45, Rue Scheurer Kestner. |
| Etaples (P.-de-C.) | Ĝendarmo Lamouche | Gendarmerie. |
| Houdain " | S-ro Flaczinski Ignace | 29, Rue Mitry. |
| Lille (Nord) | S-ro Rohart Aristide, Profesoro | 85, Rue des Tailleurs. |
| Valenciennes (Nord) | F-ino Dubuisson, | Avenue Gérard-Girard. |
| | S-ro Liétard, Profesoro | 15, Rue Derrière-les-Murs. |

Adresŝanĝo

Berck-Plage S-ro Sibille, antaŭe : 7, Rue A. Danvin,
loĝas nun : 13, Rue Armand.

NIA VIVO

Joyce kaj Gordon HAWKER, la iamaj gefianĉoj, kiuj ĉeestis la 1-an Konfederacian Kongreson en Bulonjo, havas la ĝojon anonci la naskiĝon de sia filino Karen Maria (la 18-an de Junio 1963).

Sendu gratulvorton al la jena adreso : 66 Black Bull Rd, FOLKESTONE, (Kent) Anglujo.

NEKROLOGO : La 8-an de junio 1963 mortis en sia 82-a jaraĝo
S-ino Vidvino Marie-Ange BELLOIR, bopatrino de nia kasisto.
Ni petas S-ron Jacques DOYELLE, ke li akceptu kun sia edzino nian sinceran kondolencon.

Hénin-Liétard : Okazis sukcesa Esperanta ekspozicio, sabaton 15-an kaj dimanĉon 16-an de junio. Pli ol 300 personoj vizitis ĝin malgraŭ la fakto, ke samtempe okazis superekspozicio. Pluraj federacianoj vizitis ĝin.

ĈU VI JAM PAGIS LA FEDERACIAN KOTIZON 1963 ?
Se ne, faru tion senprokraste, ĝirante la monon al :
C.C.P. LILLE 517-15. Antaŭdankon!

Le Gérant Responsable : Lucien BOURGOIS, 21, Rue Gambetta, NOYELLES-GODAULT, (Pas-de-Calais).